kaj la Reĝo, almetinte la okulvitrojn, ĉirkaŭrigardis por sciiĝi kiu parolas.

Alicio povis certiĝi, same kvazaŭ ŝi rigardus la ardezojn de malantaŭ iliaj ŝultroj, ke ĉiuj ĵurintoj skribas sur la ardezoj "Stultuloj," kaj eĉ ŝi povis rimarki ke unu el ili, ne sciante mem per kiaj literoj silabi la vorton, devas peti la informon de sia najbaro. "Kiam la proceso finiĝos" pensis Alicio "oni havos sur tiuj ardezoj vere vidindan miksaĵon!"

La grifelo de unu ĵurinto komencis grinci. *Tion* kompreneble Alicio ne povis toleri. Do, ĉirkaŭirinte la juĝejon, kaj preninte oportunan starlokon malantaŭ li, ŝi tre baldaŭ sukcesis forŝteli nerimarkite la grifelon. Tiel lerte ŝi klopodis ke la ĵurinteto (ĝi estas ja Bil Lacerto!) tute ne povis kompreni kien ĝi malaperis. Li do, post longa ĉirkaŭserĉado, fine klopodadis kiel eble plej bone skribi per unu fingro. Sed ne multe utilis *tio*, ĉar la fingro faris sur la ardezo nenian postsignon.

"La Heroldo legu la kulpigon" diris subite la Reĝo.

Laŭ tiu ordono, la Blanka Kuniklo trifoje ludblovis la trumpeton, kaj poste malvolvis la pergamenan rulaĵon, kaj legis laŭte:

*La Kera Damo bakis tortojn*
*En iu somertago!*
*Lakeo ŝtelis tiujn tortojn*
*Kaj kaŝis sub kratago!*



"Vi tuj konsideru la verdikton"
Reĝo, direktante siajn rigardojn al
"Ne, ne ankoraŭ" vigle intermetis
"Antaŭ tio estas multe da procedoj
"Alvoku la unuan atestanton" di
la Reĝo.

La Blanka Kuniklo tuj blovis trif
peton, kaj laŭte kriis:—"Unua ates

La unua atestanto estis la Ĉap
venis en la ĉambron tra flanka por
en unu mano tetason kaj en la al
buterpano.

"Pardonu, via Reĝa Moŝto" li ko
mi kunportas ĉi tiujn teaĵojn; kian
la alvokon, mi ne ankoraŭ finis la te

"Vi devis esti fininta" diris la R
vi komencis?"

La Ĉapelisto rigardis al la Martl
Gliro, kiuj jam sekvis lin en la
stariĝis kune, brako en brako.

"Je la dekvara de Marto, mi kred
diris.

"Dekkvina," "Deksesa" korektis
poro kaj la Gliro, preskaŭ sammom

"Elskribu tion" diris la Reĝo al
Laŭ tiu ordono, la ĵurintaro els
tri datojn sur la ardezoj; poste
sumon, kaj eligis solvon en sp
spesdekoj!

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTE